

No 03
1969


G.L.GIMELLI


# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti









IFEA

## 21-a I.F.E.F.-KONGRESO = AVIGNON (Majo 1969-a)

### RESUMO DE LA TEKNIKA PRELEGO: "LA FRANCAJ FERVOJOJ KAJ LA GRANDAJ RAPIDOJ"

"Pli rapide, ĉiam pli rapide!" Tio estas la postulo de la moderna homo. La Fervojo ne restis ekster ĉi tiu regulo. De 144 km/h, en la jaro 1890, la monda rapid-rekordo sur reloj regule plialtiĝis kaj, en 1955, ĝi atingis 331 km/h sur la franca reto.

Niaj trajnoj ekkonos novan eraon, ĉar, en pluraj landoj, kelkaj el ili jam veturas ĉiutage je 200 km/h. La efektivigo de veturadoj je granda rapido nun estas limigata, ĉefe pro kondiĉoj pri la bremsado, la adhereco, kaj la stabileco, sed ankaŭ pro la formado de ondoj tra la reloj kaj la katenario, kaj pro la estiĝo de vibradoj en la veturmaterialo. Tamen, el tio, nenio ĝenas por veturi ĝis 350 km/h. Male, la trakolinio ofte konsistigas delikatan problemon, ĉefe pro la kunekzistado de vartrafiko, malrapida kaj relative peza, kaj de pasaĝertrafiko, rapida kaj relative malpeza. La relkromalto ĉe kurboj sekve devas esti kompromiso. La limigoj pri la variadoj de la nesufiĉo de rel-kromalto, kiuj intervenas ĉe la kurbofinaj kunligoj, ne estas devigaj pro sekurecaj kialoj, sed pro pasaĝeraj komforto-postuloj. De tiam, aperas la graveco de la vagonoj nomitaj "pendolaj". Krome, por veturi rapide sur ekzistantaj linioj, S.N.C.F. plibonigis la brems-sistemojn kaj la signaladon. Ankoraŭ restas tri bariloj: la relnivelaj pasejoj, la envicigo de la rapid-trajnoj en la nunan trafikon, kaj la neceso ricevi la bezonatajnkreditojn.

El la aktualaj realigaĵoj sur reloj, oni devas citi: 1) la novajn lokomotivojn, kiuj rapidas ĝis 200 km/h kaj eĉ 240 km/h; 2) la trajnon "Capitole" kiu, ekde 1967, kunligas Paris kun Limoges (400 km) en 2h 54', kaj Paris kun Toulose (713 km) en 6h. La nombro de la pasaĝeroj pligrandiĝis je ĉirkaŭ 40 %; 3) la turbin-trajnon, kiu rapidas je 230 km/h, kaj kiu estas ekipita per turbin-motoro (810 kW) de la helikoptero "Super Frelon" kaj per dizel-motoro (330 kW).

De la Simpozio en Vieno (1968), ni ricevis la plej aktualajn opiniojn de la U.I.C.-membroj pri la estonteco de la fervojoj:
Rapido de 300 km/h estas ebla, se oni uzas potencajn trakciilojn, ĉefe el la tipo "motorvagono", prefere ol la klasika lokomotivo. La rapido-zono super 300 km/h nun ŝajnas esti privilegia kampo por la ne-konvenciaj teknikoj. Tamen, necesas ĝisfunde esplori ĉiujn eblecojn de la sistemoj subtenataj per radoj, antaŭ ol fari decidon pri la neceseco adopti novajn sistemojn. La novaj prototipoj de turbin-trajno ja veturos ĝis 300 km/h, kaj la kreado de nova fervoj-linio estas promes-riĉa: inter Paris kaj Lyon (430km) en 2h aŭ eble en 1h 48'.

El la ne-konvenciaj teknikoj nun provataj aŭ studataj troviĝas: 1) la aerglita motorvagono, kiu veturas (ne sur sed) iomete super betona trako. Duonskala veturilo estis provata, en Gometz, ĝis 422 km/h en januaro 1969. Baldaŭ estos provata veturilo, en normala grandeco, sur 20-kilometra trako norde de la urbo Orléans; 2) la linia elektromotoro, kiu ŝajne baldaŭ eliros el la eksperimenta stadio, kaj kies stator-pecoj estas laŭlonge disvolvitaj sur la trako, dum la lini-forma rotoro troviĝas sub la lokomotivo aŭ motorvagono.

Konklude, oni povas aserti ke, fronte al siaj konkurencantoj, la Fervojo povas sin defendi, ĉar ĝi estas konkuriva. Laŭ ni, ĝiaj ĉef-atutoj estas la grandaj rapidoj kaj la trafik-aŭtomatigo.

Fine, ni memorigas parton de la deklaro de S-ro Louis ARMAND, ĝenerala sekretario de U.I.C.: "...estas sur la tut-Eŭropa nivelo, ke la Fervojoj devas pripensi sian estontecon".

André BLONDEAUX

## KUNSIDOJ DUM NIA 21-a KONGRESO

Gravaj decidoj estis alprenataj dum la kunsidoj de la 21-a IFEF-Kongreso en Avignon. Fakte estis elektitaj du junularaj kromkomitataninoj: Greta Gössl kaj Denise Hervouet; estis unuanime reelektitaj kiel ĉefkomitatano s-ro Greutert kaj kiel komitatano A) ĉe U.E.A. d-ro Bàcskai.

Oni donis al niaj membroj, eksprezidanto s-ro De Jong, kaj fraŭlino Lemonnier eksprezidantino de F.F.E.A. kaj nun komitatanino, la orajn medalojn de F.I.S.A.I.C. kiel meritplenaj en la internacia organizaĵo.

Aliaj decidoj temis pri la frontpaĝo de "L.I.F.", ĝis nun iomete funebra: ĝia modernigo estas de ĉiuj dezirata. Oni starigis statutkomisionon por krei statutsuplementon ĝis 1971-a: Oni vocdonis por kvar membroj: Barnickel, Blondeaux, d-ro Bacskai, Haŭge, krom s-ro Giessner por la estraro.

Unuanime estis akceptita la aliĝo de Rumanio kiel nova landa Asocio.

La 22-a IFEF-Kongreso estis fiksita en Rimini de la 16-a ĝis la 22-a de majo 1970-a; la 23-a okazos en Ljubljana (Jugoslavio) dum la jaro 1971-a kaj la 24-a en Praha (Ĉeĥoslovakio) dum 1972-a.

## TRILANDA KUNVENO EN ARNOLDSTEIN (AŬSTRIO)

Ĉeestis preskaŭ 150 samideanoj, kunvenintaj plejparte de Aŭstrio kaj Jugoslavio. Ĉeestis ankaŭ niaj membroj Ferrero kaj Tarlindano el Venezio kune kun kelkaj el Trieste gvidataj de amiko Pipan.

Sabaton la 5-an de aprilo post vespermanĝo, okazis la kunveno ĉe la VOLKS-Heim en Arnoldstein. La urbestro salutis la gesamideanojn kaj bondeziris al ĉiuj bonan laboron. Ĉeestis ankaŭ la reprezentantoj de la Laborista-Ĉambro kaj aŭtoritatoj de la regiono Karintio, kiuj nin salutis: Inter alie eminenta esperantisto s-ro Emil Vokal de la Viena Radio. Iuj oratoroj parolis pri la neceso de unu sola lingvo kiel interkomprenigilo por disvolvi, sekve, pli interesan kunlaboron inter la popoloj de la tuta mondo.

Je la nomo de la Veneciaj Fervojistaj Esperantistoj, estis donata al la Prezidanto de la "TRILANDA KUNVENO" arta reproduktaĵo de la "gondolo", kiel simbola kuniĝo de la diversaj marbordoj. La Vienaj Esperantistoj donacis al la Italaj kaj Jugoslavaj Esperantistoj diskon pri poezioj kaj fabeloj.

Poste estis projekciitaj filmoj pri la Varna 20-a IFEF-Kongreso okazinta en majo 1968-a (vizito al Sofia, al Rila Montaro kaj Monakejo kaj al Ora Marbordo de la Nigra Maro). Estis agrable revidi konatajn lokojn kaj amikojn. Oni projekciis ankaŭ belegan kolorfilmon pri la festivalo de la popoloj kiu okazis en Ljubljana la pasintan someron.

Dimanĉon la 6-an de aprilo, Paskofesto. Malfermo de la kunveno je la 9-a h.; la Itala grupo estis reprezentata de la samideano Pipan el Trieste.

Post interŝanĝo de koraj bondeziroj oni legis agrablan poezion, verkitan de la Triesta samideano Angelo Bronzin. Post la legado sekvis varmaj aplaŭdoj. Ankoraŭ kelkaj oratoroj parolis pri la neceso ke Esperanto estu lernata eĉ dum la infaneco, por ke ĉiuj konu la ekzistadon de helpa lingvo.

Je la fermo de la paroladoj, post la komuna fotografado de la multnombraj kunvenintoj, ĉiuj tagmanĝis kun bona apetito kaj granda gajeco.

Je la 14-a, oni forvojaĝis al famkonata Granizka-Gora, centro de vintraj sportoj. Varmaj manifestacioj inter la gepartoprenantoj precipe inter la plej junaj. Rimarkinde: la 13-jara junulino Susane Quietensky (n-ro 2640 Gloggniz-Niederösterreich) donis sian adreson, por korespondi, al 8-jara knabeto Paolo Tarlindano (filo de fervojisto en stacio Venezia S.L.).

Ĉiuj gepartoprenantoj promesis denove renkontiĝi la venontan "TRILANDAN KUNVENON 1970-a" kiu okazos en Trieste. Oni salutis kaj ĉirkaŭbrakis unu la alian, la Jugoslavajn samideanojn veturantajn al Ljubljana; poste, per aŭtobusoj kaj aŭtomobiloj, oni akompanis la Italajn geesperantistojn al la stacidomo de Tarvisio.

Korajn gratulojn al samideano Walter Stuppnig el Arnoldstein kiu perfekte aranĝis la kunvenon.

Ĝis la revido venontjare.

Renato FERRERO

F.I.S.A.I.C. - DOPOLAVORO FERROVIARIO. - I.F.E.A.
INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO "I.F.E.F."

## 22-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

RIMINI (Italio) de la 16-a ĝis la 22-a de majo 1970-a.

### P R O V I Z O R A   P R O G R A M O

Sabaton la 16-an de majo: Gazetara Konferenco. Alveno de la Kongresanoj. Kunsido de la IFEF-Estraro kun L.K.K. Interkona vespero.
Dimanĉon la 17-an de majo: Diservo. Fotografado. SOLENA MALFERMO DE LA K. Vizito de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Folklora vespero.
Lundon la 18-an de majo: Laboroj de la Komitato kaj Komisionoj. Duontaga ekskurso al San Marino (Malnova sendependa Respubliko).Internacia balo.
Mardon la 19-an de majo: Laboroj de la Komitato kaj Komisionoj.Piedpilkluda maĉo. Fakprelegoj kaj filmoj. Junulara vespero.
Merkredon la 20-an de majo: Laborkunsidoj (Plena Asembleo). Filmoj kaj vizitoj al Fervojaj instalaĵoj. Teatra vespero.
Ĵaŭdon la 21-an de majo: Duontaga ekskurso al Ravenna. Fermo de la Kongr.
Vendredon la 22-an de majo: Tuttaga ekskurso al Bologna.

LA LOKA KONGRESA KOMITATO

Konstanta Adreso: Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italio).
Lastaj tagoj antaŭ la Kongreso: ĉe "DOPOLAVORO FERROVIARIO", Viale Regina Margherita, 109 = I-47037 RIMINI (Italio).

## INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-SKISEMAJNO 1970

En la unua semajno de februaro 1970-a okazos la 11-a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno "I.F.E.S." en la montara regiono de Malà Fatra aŭ Velkà Fatra (Malgranda aŭ Granda "Fatra") en Slovakio.

La loĝigo ni povas certigi en 2-4 litaj ĉambroj. Sendu vian aliĝon kaj petu pluajn informojn al jenaj adresoj: - ĝis la 30-a de junio 1969 al s-ro Ladislav Kovàř, ŜD VŜD Hliny, bl. VII/405 B, ŽILINA, C.S.S.R.-Ĉeĥoslovakio, kaj de la 1-a de julio ĝis la 31-a de aŭgusto 1969 al s-ro Ladislav Kovàř, U Kostelìčka č. 519, ČESKÁ TŘEBOVÁ, Č.S.S.R.-Ĉeĥoslovakio).

### a n o n c e t o

Kun diverslandaj gefervojistoj ŝatas interkontaktiĝi skribe, cele reciproka interŝanĝado de leteroj, bildkartoj, lokomotivfotografaĵoj, revuoj, poŝtmarkoj kaj aliaj fervojaĵoj, fervoja emeritulo kiu ĉiam sentas sin juna por vigla interkorespondado. Al ĉiuj gekolegoj li nepre respondos.

Bonvolu skribi al Růžička Vàclav, DĚČIN VI, Kràsnostudenecká 731/69, Ĉeĥoslovakio.

## 54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

HELSINKI, 26 julio - 2 aŭgusto 1969
Sub la Alta Protektado de D-ro Urho KALEVA KEKKONEN, Prezidanto de Finnlan.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO 1969 - La Estraro de UEA akceptis por la 22a sesio de I.S.U. proponojn pri prelegoj de entute 9 profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj: prof-oj Armand, Bokarev, d-ro Chiussi, Prof.Kääriäinen, mag.Setälä, Inĝ.Simeonov, Prof.Stöp-Bowitz, prof.Thewrewk kaj prof. Lapenna. Rektoro de I.S.U. 1969 fariĝas prof. d-ro Vilho Väisälä.

DIAPOZITIVOJ PRI HELSINKI - Ĉiu Esperanto-societo povas prunte ricevi de Fondumo Esperanto (Esperantotie 4, Iirislahti, Helsinki) serion de 36 diapozitivoj pri la urbo de la 54-a Universala Kongreso.

LOĜADO MALMULTEKOSTA - Lastatempe LKK eltrovis eblecon loĝigi kongresanojn en aparta komuna loĝejo po 4,50 fmk(=3,80 gld) por ĉiu nokto.

ALLOGAJ ARANĜOJ POR BLINDULOJ - Paralele kun la 54-a UK okazos la 37-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Ankaŭ ĝi trovos lokon en la kongresa komplekso Dipoli-Otaniemi, kie ekzistas bonegaj kondiĉoj por loĝado, manĝado kaj kunvenoj. La provizora programo antaŭvidas ekskursojn, teatraĵojn kaj fakajn vizitojn. Okazos ankaŭ antaŭrenkontiĝo en kampara loko Rautalampi.

NOVA K.K.S. - La Universalaj Kongresoj de Esperanto havas Novan Konstantan Sekretarion. S-ro Mikulaŝ NEVAN, ĉeĥo, transprenis la oficon el la manoj de s-ro Glauco G. POMPILIO, kiu eksiĝis post 7-jara funkciado.
STATISTIKO - Ĝis la 27-a de majo aliĝis 1577 personoj el 35 landoj.

## 40-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

COMO = 13-18 septembro 1969. OFICIALA KOMUNIKO

La oficiala adreso de la Kongreso estas: Congresso di Esperanto, Azienda Autonoma di Soggiorno, Piazza Cavour - 22100 COMO. Ĉia korespondado devas esti tie adresata.

La esperantistoj, kiuj deziras aliĝi al la kongreso estas petataj prizorgi, kiel eble plej frue, la mendon de hotelĉambroj, ĉar dum septembro en Como estas ankoraŭ "alta sezono" kaj, mendante lastmomente, oni riskas provi disponeblajn nur la hotelojn plej altprezajn. Oni ankaŭ aldonas ke, ekzistas en Como kelkaj malgrandaj, kvarklasaj hoteloj, kies prezoj estas sufiĉe favoraj (1200/1700 lirojn ponokte kaj persone). Kiuj deziras antaŭmendi ĉambrojn tie estas petataj fari ĝin kiel eble plej baldaŭ adresante la petojn al la Loĝiga Servo de la Kongreso, ĉe: Esperantista Grupo Como, via Diaz 26, 22100 Como, kaj aldonante etan antaŭpagon. Por la junuloj estos ankoraŭ je dispono 40/50 litoj ĉe la loka Junulargastejo, kiu situas ĝuste en la parko de Vilao Olmo, sidejo de la kongreso. Laŭ akordoj la gastej-patro permesos al la kongresanoj vesperan rehejmiĝon ĝis noktomezo.

La programita ŝipekskurso sur la lago, kiu okazos merkredon 17-an de septembro, estos senpaga por la kongresanoj, ĉar oferita de "Ente Provinciale Turismo". La partoprenontoj pagos nur la koston de la bankedo en Bellagio.

En la programo de la Fakaj Kunsidoj estas ĝis nun fiksitaj sekvantaj:
Dimanĉon 14/9 - 18,00 h. Itala Esperanto Junularo.
Lundon 15/9 - Itala Instituto de Esperanto, ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A.", Muzika Esperantista Ligo.

## N I L E G I S

KOSMO-Revuo de Martinus Kosmologio - N-ro 1/1969. 24-paĝa kvaronjara revuo esperantlingva. Eldonita de Martinus Instituto-Esperanto Sekcio, Mariendalsvej 94-96=DK-2000 KOPENHAGO F.Danlando. Jara abono 2 usonaj dolaroj aŭ egalo

PERFABRIKOJ DE KLEMENT GOTTWALD en Vitkovice, Ostrava 31, Ĉeĥoslovakio. Nova prospekto kiu pruvas ke Esperanto pli efike servas en propagando kaj komerco ol naciaj lingvoj. Ekzemplerojn, demandojn kaj mendojn postulu je adreso: Dům kultury VŽK 4-Esperanto.Ostrava 1 Ĉeskoslovensko.

ESPERANTA HEROLDO- Organo de Esperanto-movado en Slovenio. N-ro 1-a majo 1969. Jaro I. Redakcio kaj administracio: Ljubljana, Tavĉarjeva 2/I (Jugoslavio). Abonkotizo 12 steloj. Ĝia slogano:"Viaj venontaj ferioj estos pli belaj per Esperanto en Volparija".

ESPERANTA TURISTO- N-ro 3/1969. Eldonas Turista Societo en Ljubljana. Ulica Moŝa Pijade 22 (Jugoslavio).

ARGENTINA ESPERANTISTO-Organo de la Liga Argentina de Esperanto. N-ro 4 aprilo 1969-52-jaro. Direkcio: Paraguay 2357 BUENOS AIRES (Argentina). Donas informojn pri la enlanda movado: Nacia Kongreso, organizoj kiu disvastigas la Internacian Lingvon, rakontoj, k.t.p.

VERDA FAMILIO- Neregula dulingva cirkulero por favorantoj de Internacia Lingvo. Eldonas: Esperantista Rondeto ĉe OB Mêst NV C.Dub. Redaktas D-ro J. Hradil, Ĉeský Dub 137/III, distrikto Liberec, Ĉ.S.S.R.

HIMNO DE LA EŬROPAJ FEDERALISTOJ- Versoj kaj Muziko: D-ro A.MENABENE. Esperanta traduko: D-ro L.MINNAJA. Eldonas: Petro M.Urbaitis. Piazza S.M.Ausiliatrice,54 = 00181 ROMA (Italia). Veĥontfoje ni publikigos la himnon kiu estas aŭspicio al amo kaj paco inter ĉiuj Eŭropaj popoloj.

RADIO ROMA-ESPERANTO - Casella Postale 320 = I-00100 ROMA (Italio).Jaro 1969 La dissendoj okazas de h.21 ĝis 21,20 (M.E.T.).Ondlongoj:m.25,42;30,90;41,24 JULIO-Dimanĉon la 6-an: Tra la literaturo. 13-an: Novaĵoj el Italio. 20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto. 27-an: Leterkesto.

Fakestro: D-ro R. CORSETTI